

Informriĉa naturo

Eŭropo travivas kvar malvarmajn eraojn dum la Glacia Praepoko. La tria, kies nomo estas «Riso» (Riss), estis la plej ampleksa, tio estas, ke la glaĉeroj el la Alpoj sukcesis salti trans la montaro Ĵuraso kaj etendiĝis al la Nordo tra Francio, Germanio.... Poste sekvis la kvara glacia erao «Vurmo» (Würm) iom pli modesta, kaj nia nuna epoko situas en la interglacia tempo post Vurmo. Laŭ tio oni povas supozi, ke eble iam venos kvina glacia erao, kiu scias, ne ni vidos tion.... Niaj vivoj estas mallongaj kompare kun geologiaj epokoj....

Dum la tria Glacia Praepoko Riso la glaĉeroj estis dikaj kaj sufiĉe «viglaj» por supreniri sur la montojn de Ĵuraso, kiu naskiĝis antaŭ tiu Glacia Praepoko kiel eĥo al la naskiĝo de la Alpoj. Se oni memoras, ke la meza alteco de la Meza Ebenajo, kie situas Berno kaj Zuriko estas 425 m super marnivelo kaj la ĵurasaj

montoj kulminas je 1200 ĝis 1600 metroj, tio estas vera grimpado! Tamen en Ĵuraso troviĝas kelkaj lokoj, kie la glacio ne venis, ĉar eĉ dum tiu vigla Ris-periodo la glacio ne ĉie estis sufiĉe dika. Do formiĝis kvazaŭ insuloj sen glacio. Oni povas viziti ilin en la nuntempo. Multaj homoj, ĉefe biologoj kaj botanikistoj, vizitas tiujn lokojn, ĉar tie vidiĝas kaj vivas plantoj de tiu praepoko, de antaŭ la Glacia Praepoko.

Post legado de la ĉi-supraj klarigoj vi povas kompreni la alvenon de migraj ŝtonegoj. La lasta Glacia Praepoko Vurmo ne saltis super Ĵuraso, sed estis bremsita de ĝi. Kiel ĉiuj glaĉeroj la glacio de la Vurmaj glaciacaj langoj surhavis sur si ŝtonoblokojn alpdevenajn, ĉefe el granito, nomitaj morenoj. La glacia lango antaŭeniras same kiel rivero, kvazaŭ fluas. Tamen pro varmiĝo de

klimato malkreskas, do la fina bilanco estas negativa. Pro tio la granitaj rokoj alpdevenaj estis deponitaj laŭ la montaro Ĵuraso. Oni vidas kelkajn en la supera parto de la urbo Neŭŝatelo ekzemple, kaj laŭ tuta Ĵuraso ili vidiĝas kiel ornama ĉeno sud-oriente de la montaro. Ilin oni nomas «erratique» en la franca lingvo, kun signifo «perdita», ĉar la ŝtonegoj venis el alia regiono kaj estis transportitaj de la glaĉeroj.

Al ĉiuj infanoj en Neŭŝatelo oni rakontas, ke la fama grandega migra ŝtonego nomita «Pierre-à-Bot» turniĝas ĉiufoje, kiam ĝi aŭdas la sonorilojn de la urbo, kiuj anoncas noktomezon. Kaj tio estas vero!! La klarigon pri tio vi ricevos en Metabjeo dum nia kongreso, kaze ke vi tiam ankoraŭ ne trovis ĝin !....

Mirejo

Nur liberaj homoj

En la Meza Ebenajo de Svislando (le Plateau Suisse) vivis Helvetoj, alvenis Romianoj, poste regis feŭdismo kaj konstruiĝis kasteloj. Dum tiuj diversaj epokoj troviĝis en Ĵuraso nur sovaĝa naturo kun lupoj, ursoj, kapreoloj, vulpoj kaj aliaj bestoj. Edena ĝardeno? Eble. Tamen pro la klimato ne ofte eblas vivi nuda en Ĵuraso.... brrrrrrrrrrrrrrrrrrrr... Vitofolio ne sufiĉe protektas kontraŭ subnulaĵ temperaturoj!

Do la pintoj de Ĵuraso ne konis feŭdismen. Dum tiu epoko, kie feŭdismo regis, la superuloj kelkfoje liberigis la subulojn

kaj tiam diris al ili: «Iru al la montaro kaj tie vi povas faligi arbojn, konstrui lignan dometon, ĉasi, planti legomojn... iru, vi estas liberaj.» Kaj tiel okazis. Pro tio ekzemple en Ĉaŭdefono (1000 metrojn super marnivelo) ne staras kastelo. Neniam regis tie feŭdismo. Oni povas konjektii, ke tio kontribuis al la etoso de la urbo: liberema, maldekstrema, inventema, sendependema. La nuntempaj streĉoj inter la supera arbara parto de la kantono Neŭŝatelo kaj la suba parto ĉelaga certe ligiĝas al tiu historia fakto.

Ni ne forgesu, ke en Ĉaŭdefono naskiĝis la arkitekto Le Corbusier, la inĝeniero Louis Chevrolet, la verkisto Blaise Cendrars... Plie mi aldonu, ke kelkaj artistoj el Laŭzano aŭ Ĝenevo venis al Ĉaŭdefono por vivi en tiu malfermita urbo pro la peza burĝa tradiciema etoso de la menciitaj urboj.

Pro tiu fekunda etoso esperantistoj ekagis en tiu grava ĵuraso urbo, kie nun staras du Esperanto-centroj.

Mirejo

Grava pasejo : *Jougne*

Jougne estas vilaĝeto sur paseja strato inter Vallorbe, kantono Vaŭdo, Svislando, kaj Pontarlier, departemento Doubs, Regiono Franĉkonteo, Francio. Ŝajnas ke tiu pasejo jam estis uzita de Romianoj. Certe en la Mezepoko homoj povis el Svislando atingi Francion tra tiu aro da kluzoj kaj fendoj. Charles le Téméraire uzis tiun pasejon por ataki la Svisojn, kaj la batalo okazis en Grandson apud Yverdon, tuj sube de Vallorbe ĉe la neŭŝatela lago. Alia interesa evento okazis tie la 26an de aprilo 1945, kiam Marŝalo Pétain, tiam restadanta en Svislando, estis transdonita al Francio, la «liverado» de tiu historia personeco okazis en Jougne.

Nepras rimarki, ke la pasejoj en Ĵuraso

estas altaj kaj proksimaj ĉe la pintoj. Jougne situas je 1012 metroj super marnivelo kaj la apuda monto Mont d'Or atingas 1460 metrojn. Do la diferenco atingas 448 metrojn. Kompare kun tio ni rigardu en la Alpoj: la pasejo Grimsel situas je 2165 metroj kaj la apudaj montoj atingas 4000 metrojn aŭ pli. Do la diferenco atingas kvazaŭ 2000 metrojn. En Ĵuraso la formoj estas rondaj, la faldoj paralelaj. Aperas «cluses» tranĉoj tra la faldoj. En la Alpoj la montoj estas rokaj, pintaj, kaj la valoj estas profundaj.

Tiu pasejo gravas pro tute alia kialo: la akvoapartigado. Sude de Jougne, en Vallorbe kaj apudaj regionoj de la kantono Vaŭdo la akvo fluas al rivero Orbe, kiu fluas sub la nomo Thielle en

la neŭŝatelan lagon. Poste la akvo fluas al rivero Aare, poste Rejno kaj tiu lasta atingas la Nordan Maron en Roterdamo, Nederlando. Norde de la pasejo Jougne la akvo fluas al rivero Doubs, kiu fluas al Saône, kiu fluas al Rodano, kiu atingas la Mediteraneon. Do se vi staras en la pasejo Jougne, vi povas diri: la norda akvo fluas al la Sudo kaj la suda akvo fluas al la Nordo. La akvo de la valo de Ĉaŭdefono kaj Le Locle same fluas al Doubs kaj al la Sudo. Male la akvo de la valo de La Sagne kaj Les Ponts-de-Martel, tute apud Ĉaŭdefono, same la akvo de la valo de La Brévine, fluas subtere al Val-de-Travers, kies rivero Areuse fluas al la neŭŝatela lago do al la Nordo.

Mirejo

Kongresi en Metabjeo



Metabjeo (25) Métabief

de
marto 30a
ĝis
aprilo 2a
2013

Ĉelima
68a kongreso de
SAT-Amikaro



La kongresejo

Azureva

15 rue de la Rançonniere

25370 Métabief

03 81 49 45 45

OKK SAT-Amikaro 2013 -

132-134, Boulevard Vincent-Auriol - 75013

Paris - 09.53.50.99.58

retadreso : sekretario@sat-amikaro.org

La kongresmarko



ESPERANTO

Ĉelima

68a kongreso de
SAT-Amikaro

de
marto 30a
ĝis
aprilo 2a
2013

Metabjeo (25) Métabief

IOM PRI LA URBETO METABIEF

Je 4 km de la svisa limo kaj je 2 km de la nacia strato numero 57, kiu ligas Pontarlier en Francio kun Vallorbe en Svislando situas Métabief, piede de monto Morond. Tiu vilaĝo estas konata pro la beleco de la ĉirkaŭanta verda pejzaĝo. La teritorio de la vilaĝo etendiĝas sur 574 hektaroj en alteco de 930 m ĝis 1420 m.

La nomo Métabief devenas de la praa franca lingvo « mete », kies signifo estas limoŝtono, kaj « bief », rivereto. La rivereto en Métabief nomiĝas la ruĝa Bief, ruĝa rivereto. Tiu rivereto estis limo inter « bariochage » de Pontarlier (bariochage estas unuigo de liberaj homoj) kaj la posedaĵo de Jougne, al kiu Métabief apartenis.

Oni povas supozi, ke tie estis tranoktebleco sur la strato inter Pontarlier kaj Laŭzano. Jean de Chalon, sire d'Arlay liberigis la loĝantojn de Métabief en 1393. Kompreneble la loĝantoj kreskigis cerealojn kaj legomojn por nutri sin, tamen plie ili trovis kaj elfosis feron ekde la dekkvina jarcento ; per tiu metalo homoj povis produkti la ilojn bezonatajn por la agrikulturo kaj arbaroprizorgado.

En tia regiono la centraj okupoj de la homoj estas agrikulturo, bredado de bovinoj por akiri lakton kaj viandon kaj ekspluatado de arbaroj. En Ĵuraso ambaŭflanke de la limo naskiĝas interesaj sociaj strukturoj nomitaj «Les communaux», kie ĉiuj kune, komune, zorgas kaj organizas la bezonatajn laborojn kaj decidojn.

En Métabief ekde la mezo de la dudeka jarcento naskiĝas alia grava okupo : turismo kaj vintraj sportoj. En la jaro 2009 loĝis tie ĉirkaŭ mil homoj. Tie staras 2200 feridomoj kaj diversaj fericentroj kaj hoteloj. Multaj diversaj sportebloj ekzistas kaj por la vintraj restadoj kaj por la someraj restadoj. Vendejoj kaj butikoj abundas, kie oni povas aĉeti la lokajn produktojn : fromaĝon (Comté), kolbasojn (saucisse de Morteau) kaj aliajn.

Distanco Pontarlier – Métabief : 18 km
Distanco Métabief – limo kun Svislando (Jougne) : 4 km
<http://fr.wikipedia.org/wiki/M%C3%A9tabief>

KIEL ATINGI LA KONGRESLOKON METABIEF ?

Trajne

El Parizo (gare de Lyon) per TGV al Frasne.
Frasne situas sur la linio Parizo – Lausanne.
En Frasne prenu buson al Métabief – Jougne – Vallorbe.
Métabief estas nia kongresloko. Jougne estas pasejo kaj landlimo.
Vallorbe jam estas en Svislando.
Elbusiĝu en Métabief Urbodomo (Mairie).
La veturado daŭras proks. 40 minutojn.
Estas ĉiun tagon po 4 veturadoj en ĉiu direkto.
El la urbodomo estos vojmontriloj al Azureva kun indiko ESPERANTO.
Veturilo venos el la kongresejo samtempe kiel la busoj alvenos el Frasne urbodomo kaj la ŝoforo prenos vian valizon.

Aŭte

Distanco Pontarlier – Métabief : 18 km
En Pontarlier sekvu la direkton Vallorbe Lausanne Suisse : Uzu la straton N57 kaj poste E23
Post 14 km uzu la straton D45 en la direkto de LES HÔPITAUX-NEUFS ET VIEUX, SAINT-ANTOINE TOUILLON-ET-LOULETEL, MÉTABIEF-MONT D'ORIGNY
Ĉe la rondirado uzu la 3an elirvojon al SAINT-ANTOINE, TOUILLON-ET-LOULETEL MÉTABIEF-MONT D'ORIGNY
Poste venas dum 3 km multaj kurboj.
Traveturu Saint – Antoine.
Ĉe la rondirado uzu la 3an elirvojon : D9.
Veturu malrapide !
Tuj poste turnu dekstren : D385
Veturu malrapide : vi forlasas Saint-Antoine kaj samtempe eniras la urbeton Métabief.
En Métabief, ne uzu GPS por Azureva (ne bone ĝisdatigita), sekvu la sagojn !

Manŭel



Manŭel, eksa elektroteknika inĝeniero kaj de nelonge emerito, pasiiĝis jam de antaŭlonge pri esperanto kaj muziko, kaj kvankam li modeste diras ke li ne estas profesia kantisto, li mirigas ĉi tie per la muzika, lirika kaj teknika kvalito de tiu ĉi nova albumo tute en esperanto kiu maturiĝis de multaj jaroj!

Manŭel memlernis muzikon kaj gitarludadon kaj ne mankis al li okazoj por kanti kaj ludi basgitaron en amatoraj muzikgrupoj dum liaj junaj jaroj. Li eĉ verkis dudekon da kantoj en la friula, lia gepatra lingvo, kaj li kantis kaj publikigis ilin por subteni tiun lingvon de la nordoriento de Italio, lia denaska regiono.

Lia ŝato por la lingvoj alportis lin al esperanto pere de kontakto kun esperanto-grupoj kiel Nova Espero en Friulujo kaj la Itala Esperanto-Federacio en kiuj li ageme aktivis ĝis kiam lia inĝeniera laboro kaj malfeliĉa operacio de la voĉkordoj devigis lin forlasi kaj esperantan kaj muzikan aktivecon.

Tiam en 2010, kiam li emeritiĝis, li revenis, kaj al esperanto, ektradukis, adaptis poemojn, kantojn, kaj al la gitaro kaj kantado malgraŭ la kontraŭindikoj de la kuracistoj.

Li memeldonis du albumojn en esperanto « Duonvoĉe ... tutkore » en 2011 kaj « Ĉu plu ekzistas Amo ? » en 2012.

Tiuj du albumoj konsistas el famaj muzikaĵoj, kaj propraj verkoj laŭ popkazona romantika stilo.

Manŭel esperas ke tiu iniciato donos al la publiko emon plu lerni kaj utiligi esperanton.

Anjo Amika



Anjo Amika estas la artista nomo de Anna Bartek, kiu naskiĝis en Kaposvár, la 19an de junio 1955. Ŝi loĝas nun en Budapeŝto.

Ŝi lernis en muzika lernejo (1961 – 1969) kaj muzikkonservatorio (1969 –

1974).

Ni lasu ŝin sin prezenti mem:

Mi kantas profesie ekde 1978 kaj en Esperanto ekde 1984.

Mi konatiĝis kun Esperanto en 1971, sed en la movado mi aktivas ekde 1984.

Mi kantis dum du Universalaj Kongresoj de Esperanto en 1987, en Varsovio kaj en 1992, en Vieno, kie debutis mia unua esperantlingva kasedo «Por vidi la mondon». El tiu ĉi kasedo estis eldonita kaj vendita entute 1500 ekzempleroj.

En 1994 estis aperigita, en 2002 reaperigita mia dua kasedo Dimanĉa Koncerto, en 2002 estis aperigita mia Kompakta Disko Bela Revo.

Ĉiujare, mi kantas en Esperanto-aranĝoj.

Miaj ĉi-jaraj recitaloj kaj koncertoj realigitaj eksterlande: en Svislando, en Laŭzano; en Pollando dum ARKONES, en Poznano; en Hispanio, en Malago; en Moravio, en Bartošovice; en Pollando, en Gliwice.

Miaj venontjaraj invitoj: dum la printempo: Métabief – SAT-Amikaro, Kongreso de Esperanto; ARKONES, Poznano; 2a Internacia Esperanto-Lernejo en Bartošovice. Pliaj invitoj estas antaŭvideblaj.

Anna Bartek / Anjo Amika

Provizora programo

Vendredon la 29an de marto		
18H00	«minimuma» akceptado	sen registrado nek disdono de dokumentoj. Kiuj alvenas vendrede, tiuj sin prezentu sabate matene por kompleta akceptado.
20H00	Neformala interkona vespero	
Sabaton la 30an de marto		
9H00	Akceptado de la kongresanoj	Disdono de ĉiuj informoj necesaj, eventualaj ĝustigoj
11H30	Bonvenigo far la urbestro	Ĉe la urbodono , kun ĵurnalistoj, eble televido, parolado kaj honorvino.
14H00	Duon-tagaj ekskursoj	vidu organizajn detalojn ĉi-sube, priskribojn ĉe la du postaj paĝoj.
14H00	<i>(Disponebla tempospaco)</i>	
15H30	<i>(Disponebla tempospaco)</i>	
17H00	Prelego far Mirejo	«Limoj»
20H00	Koncerto de Manŭel	Vidu artikolon pri li antaŭan paĝon
21H30	Koncerto de Jolane	Ni ne jam ricevis artikolon nek foton pri ŝi. Verŝajne ni havos ilin por LS92.
Dimanĉon la 31an de marto		
9H00	Unua laborkunsido	Post oficiala malfermo. Salutvortoj.
12H00	Fotado, Ludo de Mirejo	
14H00	Dua laborkunsido per laborgrupoj	
17H00	Prelego far Ĵak Le Puil	«Ja vole nevole Esperanto estas revolucia lingvo»
20H30	«Ĉirkaŭ Karmenjo»	Spektaklo de Interkant' en Salono «P. Charlin» (vidu sube)
Lundon la 1an de aprilo		
09H00	Tria laborkunsido	kun prezento de la SAT-kongreso en Madrido
14H00	Duon-tagaj ekskursoj	vidu organizajn detalojn ĉi-sube, priskribojn ĉe la du postaj paĝoj.
14H00	<i>(Disponebla tempospaco)</i>	
15H15	<i>(Disponebla tempospaco)</i>	
17H30	Parolado kun fotoj, far Mirejo	Rakonto el Japanio pri ĉelima amikeco «Sovaĝa rozo»
20H00	Koncerto de Anjo Amika	Vidu artikolon pri ŝi antaŭan paĝon
Mardo la 2an de aprilo		
09H00	TTT (Tuttaga trilandana translimado)	vidu priskribojn ĉe la du postaj paĝoj.



Cirkaŭ Karmenjo

La dimanĉa vespera spektaklo okazos en la salono «P. Charlin» kiu situas en la vilaĝo mem, sed 1,2 km for de la kongresejo. Eblas organizi kunveturadon (oni parkas ege facile) sed piedirado tute eblas, depende de la vetero.

Libro-servo

trovos lokon en saloneto «Montagnarde» (alinomota).

Informsaĝoj

...interne troviĝos, tiel ke normale vi ne perdiĝos.



Aliaj aranĝoj

Ĉio alia okazos en la kongresejo mem - krom evidente la ekskursoj - en «Salono Mont d'or» (alinomota).


Prelegoj

Restas 4 tempospacoj por unuhoraj prelegoj. Interesatoj sin anoncu.

Duontagaj ekskursoj

Fuorto de Joux

Ĝi troviĝas 15 km for de la kongresejo. Lui aŭtobuson tro kostus por tiu mallonga distanco. Ni organizos surloke kunveturadon. La vizito mem kostas 5 €




«Budoj»

La OKK ne zorgos pri aranĝoj por tiuj kiuj deziras prezenti ekster-SAT-Amikarajn aferojn: en la domo troviĝas multaj anguloj, aranĝitaj kiel diskut- aŭ ripoz-anguletoj, kie ili instaliĝu. Tamen, la prezentitaĵoj kongruu kun la eco de SAT-Amikaro, do la interesatoj nepre informu la OKKon.

Fuorto Lucotte (fromaĝfajnagejo)

Ĝi troviĝas nur 1,7 km for de la kongresejo, do kunveturado devus sufiĉe facile esti organizita, eĉ iri piede se la vetero ne malebligas. La vizito kostas 6 €, tamen kondiĉe ke estu minimume 16 partoprenantoj.



Tuttaga Trilanda Translimado



Duontagaj ekskursoj



TTT: Tuttaga Trilanda Translimado...

Marde la duan de aprilo ni havas la okazon migri tra TRI landoj.

Komence nia elirpunkto Métabief estas en Francio. Ni startos je la naŭa horo matene.

Per buso ni atingos la urbeton Montbenoît, kiu situas laŭ la rivero Doubs. Ni vizitos tie tre belan abatejon (1) konstruitan ekde la dekkvara jarcento. Tiu urbeto Montbenoît plie estas la ĉefurbo de la Respubliko Saugeais, nia dua lando, fakte eteta lando.

Tiu ŝtateto naskiĝis en la jaro 1947 dum amika manĝo en ŝercema etoso. Ĝia surfaco estas 127 km². Ni havas la honoron esti salutataj de ĝia prezidantino Sinjorino Georgette Bertin-Pourchet (2).

Poste sekvos veturado tra tre bela valo tipe jurasa laŭ la rivero Doubs. Imponaj rokoj kaj klifoj el kalkohava ŝtono videblas (3). Tie ofte sportistoj luktas en la muĝanta akvo uzante kajakojn ; laŭ la akvonivelo ni povos eble spekti tion. Tamen la organizantoj de nia kongreso nek povos

zorgi pri la akvonivelo nek povos venigi kajakistojn.

Ni povos viziti groton, kie situas preĝejo.

Je la 12a 30 ni atingos Villers-le-Lac kaj poste la ĉeliman vilaĝeton Les Pargots ; tie situas la hotelo Les Cygnes (la cigno), kie ni ricevos tagmanĝon (4). Post la manĝo je la 14a 30 ni iros piede al nia tria lando : Svislando (100 m), kie reprezentanto de la vilaĝa konsilio de Les Brenets salutos nin sur la limo. Ni povos konstati, senti, sperti, flari la limon.

Post 15minuta veturado ni atingos alian ĉeliman lokon Le Col-des-Roches, kie situas unikaĵo en Eŭropo, aŭ eble eĉ en la tuta mondo : subteraj muelejoj : Les Moulins Souterrains. Je la 15a horo ni havos gvidadon tra tiuj grotoj, kie gigantaj radoj ebligis per akvofaligo produktadon de mekanika energio. Ni malsupreniros en la teron je 30 metroj laŭ belaj sekuraj ŝtuparoj en humida klimato en temperaturo de 7 gradoj (5). Jam en la deksesa jarcento

homoj uzis tiun energiofonton, kiu situas sub la terosurfaco pro la fakto, ke en Ĵuraso en karsta regiono la riveroj ofte estas subteraj. Pri tiu impresa loko la dana poeto Hans-Christian Andersen skribis : « Ni troviĝas nun en akvomuelejo, en subtera loko. Profunde sub la terenosurfaco muĝas rivero ; neniuj supre povas supoziti tion ; akvo falas de pluraj metroj sur la bruaj radoj, kiuj turniĝas kaj preskaŭ povus aliroĉi niajn vestojn kaj eĉ faligi nin. La ŝtupoj, sur kiuj ni staras, estas humidaj kaj eluzitaj ; laŭ la ŝtonaj muroj akvo fluas kaj tute proksime vidiĝas abismo ». (1836)

Je la 16a horo 30 ni ekveturos al Métabief denove kaj atingos nian kongresejon post unuhora veturado tra la valo de La Brévine (6), alinomata svisa Siberio, Fleurier kaj arbaraj sovaĝaj lokoj rekte al Métabief.

Bonvolu kunporti vian pasporton kaj varmajn vestojn por la subtera migrado !!!

Mirejo

Duontaga ekskursoj : du fuortoj, du sortoj...

Fuorto de Joux, sufokejo por ribelulo

Tiu fortikaĵo (1) estis menciita jam en la jaro 1039. Ĝi situas inter Pontarlier kaj Jougne, ĉe vojkruciĝo en kluzo, do inter montoj. Tre efika loko por malebligi la aliron al iuj najbaraj valoj, ĝi staras sur monteto, de kie oni povas vidi la ĉirkaŭaĵon. Kvin muregoj entenas la centran konstruaĵon.

La ĉefa « gasto » de tiu tre bone protektita loko estis Toussaint Breda, generalo de Napoleono la Unua. Toussaint estis unue sklavo en Haitio, kiam li naskiĝis en 1743. Poste li fariĝis tre talenta soldato, kiu bonege sukcesis malfermi la vicojn de la atakantoj ; pro tio oni nomis lin « Toussaint Louverture » : Toussaint, tiu kiu malfermas. Breda estas la nomo de lia posedanto, de la tempo, kiam li estis sklavo. Napoleono donis al li la titolon de generalo pro liaj soldataj talentoj.

La politika situacio en Karibio estis tre komplika en tiu tempo, francoj, britoj, hispanoj luktis unu kontraŭ la aliaj. Surloke estis nigruloj pranepoj de perforte alportitaj afrikanoj, estis mestizoj, mulatoj, estis blankuloj. Aliancoj evoluis kaj ŝanĝiĝis. En tiu epoko Haitio nomiĝis Sandomingo.

Napoleono ŝanĝis la rilatojn inter la kolonioj kaj la metropolo. Tio kolerigis Toussaint, kiu ekverkis kaj publikigis konstitucion por Haitio. Tiam Napoleono siavice koleriĝis kaj ruze kaptis Toussaint kaj alportis lin al Francio en somero 1802. Napoleono elektis por Toussaint prizonon en la plej malvarma regiono de Francio en loko plej malproksima de iu maro. Toussaint forpasis tie la 7-an de aprilo 1803 pro malsano kaj manko de kuracista helpo.

Je tiu dato kutimas veni al la Arbara Fortikaĵo multaj Haitianoj kaj aliaj Nigruloj (3). Ni ne forgesu, ke en Haitio kreiĝis respubliko en la jaro 1804, temas pri la plej malnova nigrula respubliko en la mondo. Kompreneble Toussaint kontribuis al tio, sen povi travivi

tiun ĝojigan eventon....

La sepan de junio 1802 li estas portita al ŝipo, kiu krozis poste al Francio. Li forlasis sian insulon dirante : « Dum oni senpovigas min, oni fortranĉas en Sandomingo nur la trunkon de la libereco-arbo. Sed tiu arbo kreskos denove, ĉar ĝiaj radikoj estas profundaj kaj multaj. »

Kiam Toussaint alvenis, tio estis por montri, ke ne ekzistas malrespektita raso, ke ne ekzistas marĝenigita lando, ke ne ekzistas esceptaj popoloj.

Oni lasis al li sklavan bandon, el ĝi li faris armeon.

Oni lasis al li ribelulojn, el ili li faris revolucion.

Oni lasis al li loĝantojn, el ili li faris popolon.

Oni lasis al li kolonion, el ĝi li faris ŝtaton, pli bone : nacion.

Aimé Cézaire, poeto pri nigreco.

Ni povos viziti la fortikaĵon kaj la ĉelon de Toussaint, kie oni fermis la fenestron per brikoj(2). La ĉiĉerono kutimas klarigi, ke Toussaint ricevis manĝaĵojn kaj ke lia ĉambro estis hejtigita. Kion oni vidas : kamenon. En Ĵuraso la temperaturo dum vintro povas subeniri ĝis minus 40 gradoj ; dikaj muroj ne protektas kontraŭ malvarmo. De tio oni povas supoziti, ke la temperaturo en la ĉambro atingis ne pli ol 10 gradojn maksimume. Por persono, kiu devenas el tropika regiono, kie la temperaturo kutimas esti je 30 gradoj dum la tuta jaro, tio estas ne eltenebla. Toussaint mortis fine de la vintro, sen ajna kuracado.

Bv noti, ke dum la vizito de la fortikaĵo, ni devos grimpi kaj malgrimpi multajn ŝtupojn(4).

Pliaj informoj ĉe la reto:

http://fr.wikipedia.org/wiki/Fort_de_Joux

Pri tiu militoplana epoko oni povas trovi pli kompletan priskribon en http://eo.wikipedia.org/wiki/Toussaint_Louverture; <http://fr.wikipedia.org/wiki/Louverture>

Fotoj kaj klarigoj pri la fortikaĵo kaj la vizito troviĝas en <http://mirejo3.blogspot.ch/2010/05/toussaint-louverture.html>

Mirejo

Fuorto Lucotte, fajnigejo por frandaĵo

La fuorto de San-Antonio (*Saint-Antoine*) konstruiĝis de 1879 ĝis 1882 laŭ la konstru-principoj de la generalo **Séré de Rivières**. Ĝia kreado respondis al milita strategio konsistanta en kreado de fortikigitaj regionoj kun barilvorkoj kapablaj bremsi eventualan malamikan alvenon.

Ĝi ricevis la nomon **Lucotte** en 1887, memore al iu generalo de la Revolucio kaj de la Imperio.

Konstruita por ricevi 400 homojn, la fuorto, kvankam iel modelo en la ĝenro, precipe pri ventumilo, kaj mastrumado de la akvo, rapide kadukiĝis pro la progresoj de la artilerio. Ĝi fine ne multe uziĝis milite...

Superante la lagon de *Saint-Point* kaj ŝtopante la vojon de Laŭzano, ĝi havas heksagonan formon, preskaŭ regulan. La defendo de la fosajoj efektivigis el tri paf-galerioj. La kazerno situas centre. En 1908, okazis tie paf-eksperimentado kiu iom mildigis la katastrofajn samajn eksperimentadojn okazintajn en *La Malmaison*, 22 jarojn antaŭe., kio kuraĝigis la militistojn en fido pri la fuortoj konstruitaj el murŝtonoj.

Ne plu uzata, ĝi estis vendita far la armeo en 1965 al la komunumo, kiu ĝin ludonis al S-ro Marcel Petite en 1966 por esti aliigita en keloj por fajnigi fromaĝon.

Kuŝante je 1104 metroj super la marnivelo, meze de arbaro, la Fuorto Lucotte ŝirmas nun en siaj volbaj keloj el konstruŝtonoj 64000 radojn de Franĉkontea fromaĝo.

Inda vizito de unu horo kaj duono en sufiĉe malvarma medio...

Serĝo